



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Franclingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

Jarabono : 70 fkoj

P. BABIN

Le Haut des Bourrelières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1991 = 1


(JANUARO-FEBRUARO-MARTO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... La sekretoj de la Saharo



... Kaj pri Atlantido

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario : Jeannine VINCENT

26 bis, rue de Milngavie, 49150-BAUGÉ

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ĜENHAVO


	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeu)	2
Atlantido (S. Boniol)	3-5
Sekretoj de la Saharo (La Praktiko)	6-8
La franca revolucio kaj Germanujo (H. Röllinger)	9-10
Paĝo de la geknaboj	11
Monte-Kristo (trad. R. Dupuis)	12-13
Por via distro	14
La vivo en Gresillon	15-16

El Gresillon

Ekvilibrigo. Post ege sekaj monatoj pluvas, pluvegas sur Gresillon La lageto, preskaŭ senakva en septembro pleniĝis kaj la banejo povos denove akcepti la naĝemulojn venontsomere. La herbejoj denove verdas. La naturo pretiĝas por akcepti la printempajn kaj la somerajn vizitantojn.

Ankaŭ la kastelo pretiĝas. Se la metiistoj plenumos siajn promesojn, en junio estos renoviĝintaj, la klasĉambro A, la ekstera ĉambro 34 (nomata "blua ĉambro"), la unuaetaĝa ĉambro 7, la antaŭkuirejo. Espereble la klasĉambro C ne plu estos tiel "sona" dank'al sponsorba plafono. Ankaŭ komenciĝos la modernigo de la klasĉambraj meblaroj. Bona programo, kiun ebligas bonaj financoj.

La someran programon ĉiuj el vi havis la okazon jam legi. Petu ĝin se vi ankoraŭ ne ricevis. Nova sperto estos havebla de la partoprenantoj dum la Printempa Renkonto. Krom preparado de eventualaj kandidatoj por la UEA-ekzamenoj, Ilona Koutny, el la universitato de Budapeŝto, ankaŭ zorgos pri la prezentado de komputoro parolanta en esperanto pere de parolsinteza programo Esperol. Interese, ĉu ne? Ni memorigas, ke tiu printempa staĝo komenciĝos la 27-an de aprilo. Rapide aliĝu...ankaŭ por la someraj staĝoj.



Esperanto tra la Mondo



ESTONTAJ KONGRESOJ - La kongreso de SAT 1991, okazos en Ottignies (je 20 km. de Bruselo) de la 27-de julio ĝis la 2-a de aŭgusto.

- La 26-a ILEI-kongreso (instruistoj), okazos en Voss (Norvegio), de la 4-a ĝis la 8-a de aŭgusto.

- La kongreso de ICEM-esperanto estos en Smarves (sude de Poitiers, Francio), de la 12-a ĝis la 22-a de julio.

- Esperanto-staĝo, 24a-31a de aŭgusto en la montaro, en Haber-Poche, 74420, Francio. Inf. D-ino Y. Viernes, 5 rue Dr Roux, 34000 Montpellier, kiu informas ankaŭ pri la Internacia Feria Semajno, en Sète, 7a-14-a de septembro.

GRAVA CENTJARA DATREVENO - En 1991, la amantoj de la esperanto-literaturo festas la centan datrevenon de tri "grandaj steloj": Kolomano Kalocsay, Julio Baghy (hungaroj) kaj Nikolao Hoŝlov (ruso), al kiuj oni povas aldoni du aliajn poetojn: la estonan Hendrik Adamson kaj la rusan Georgij Deŝkin. Kalocsay kaj Baghy esperantiĝis la saman jaron: 1911.

PRI EROŜENKO - Lastan jaron la soveta poŝto eldonis specialan filatelan koverton por memori pri la centa datreveno de Vasilij J. Eroŝenko, blinda esperantista poeto kaj verkisto, kiu, interalie, vivis en Japanio kaj Ĉinio. Sur la koverto oni vidas libron kun esperant-lingva titolo.

EL ORIENTO - Post kurso gvidita de S-ro J. Werdin, oni rekreis Nepalán Esperanto-Asocion. Por kontakto kaj korespondado skribi al: Quest Language Institute, Nepala esperanto-Asocio, Kamalpokhari, Kathmandu, Nepalo.

La revuo "Vietnam" havas nun eldonon en esperanto. Pri la abono skribu al: D-ro Lê Niêm, 3 Nguyen Tat Thanh, Hô Chi Minh, Q 4, Vietnam. Prezo: 2 dol. por unu numero, 7 dol. por jar-abono.

Dum septembro 90 okazis, en Tianjin, esperanto-seminario por

la agado en ĝemelegitaj urboj.

Ankaŭ en Ĉinio oni reeldonis la faman "Internacia komerca-ekonomika vortaro en naŭ lingvoj" kun aldono, por la 3 000 terminoj, de la ĉina kaj de la japana lingvoj.

KORESPONDA SERVO MONDSKALA - Tiu servo, kiu ebligas trovi korespondantojn havas novan adreson. La prizorganto estas: François-Xavier Gilbert, "Vert Coteau", Longeville-en-Barrois, 55000 Bar-le-Duc, Francio.

PRI LA "VERDA" PARTIO - La franca "verda" partio, en sia lasta nacia kongreso, aprobis rezolucion favoran al la uzo de esperanto. Por la efektivigo de koordinata agado, interne de la diversaj verdaj kaj ekologiaj partioj internaciskale, se vi estas ĝis nun izolita esperantisto en tiuj partioj, rilatu kun D-ro Albert Menabene, Via Monti Sibillini, 00141 Roma, Italio, aŭ al S-ro Emile Mas, 38 rue Jean Moulin, 33220 Ste Foy-la-Grande, Francio.

ROK-MUZIKO KAJ ESPERANTO - Post apero de "numero 0", lastan jaron, aperis la numero 1 de la trimonata "Rok Gazet'" (eldonanto: Eŭrokka, 31450 Donneville). Legante tiun bone ilustritan gazeton, oni konstatas ke jam ekzistas sufiĉe densa reto de junaj muzikaj grupoj, pli malpli spertaj, kiuj kantas en esperanto, kaj kiuj, en pluraj landoj, alportas per originala vojo, novan sangon al nia movado. Eŭrokka peras ankaŭ por la vendado de kasedoj kaj diskoj.

EL VATIKANO - La "Congregacio de kultu divino et disciplina sacramentorum" aprobis la tekstojn en esperanto por la eŭkaristiaj celebradoj dum la esperanto-kongresoj.. Restas malpermesite konfesi, bapti kaj geedziĝi en esperanto.

ATLANTIDO

Kio estas - aŭ estus - Atlantido? Forperdita mita kontinento, pri kiu Platono raportas en du dialogoj. Estas tie dirite, ke Solono vojaĝis al Egiptio, kie li lernis de la pastroj en Saïs (ili estis konservintaj skribajn spurojn pri vasta insulo trans la tiel-nomataj "kolonoj de Herkulo", nuntempa ĝibraltara markolo). Edeno estis tiu imperio submare malaperinta "en la daŭro de unu diurno". Tiel okazis proksimume naŭmil jarojn antaŭ Platono (do 11 500 jarojn antaŭ nia epoko). Platono emfazas, ke ne fikcio estas la du dialogoj, sed realaĵo. Jen kelkaj eltiraĵoj:

"Granda potenco el la Atlantika Maro veninta maljuste invadis Azion kaj Eŭropon, ĉar tiutempe la ĉi-koncerna maro estis transvadebla. Etendiĝis insulo vidalvide de la enfluejo nun nomata "kolonoj de Herkulo". La vojaĝantoj povis migri de insulo al insulo kaj trae de ili iri en la tutan kontinenton marrande situantan. La unua reĝo nomiĝis Atlaso. Ĉiujn necesojn la enloĝantoj disponis; ĉiujn produktadojn el la minejoj, ĉiujn lignospeciojn, ĉiujn sovaĝajn kaj malsovaĝajn bestojn, eĉ multe da elefantoj. Tie la bestoj trovis abundan nutraĵon. Ĉio ĉi tio tiam troviĝis en la insulo sankta, bela, mirinda. Estis konstruitaj palacoj kaj temploj kaj ponto super la kanaloj plenaj je marakvo, kiuj ĉirkaŭis la antikvan ĉefurbon. En la temploj regis oro, arĝento, eburo. Abundis varmaj kaj malvarmaj akvofontoj neniam senakviĝantaj. En la komenco la tuta lando estis alta kaj kruta flanke de la maro. La urbo estis ĉirkaŭita de ebenaĵeto, kiu milde deklivis ĝis la maro. La tuta lando etendiĝis suden, kaj norden ĝi estis surrandita de montaroj. Ili superis ĉiujn niaepokajn laŭ kvanto, grando kaj belo. Svarmis arboj, riveroj, herbejoj. Oni buĉadis taŭcojn kaj sin purigis per ties

sango por sankcii la observadon de la leĝoj. Dum la tuta tempo, kiam la dia naturo efikis en la enloĝantoj, ili obeis la leĝojn kaj saĝe malvolvis en si la dian econ, ĉar nur verajn kaj altajn pensojn ili havis. Sed la dia eco estis en ili subpremata de la pasioj; la homa eco superregis kaj ili hontinde subfalas."

Kvankam skeptikis Aristotelo, platona disĉiplo, erudiciuloj en Aleksandrio taksis veraĵo la detruon de Atlantido sekve de giganta tertremo. Ni ankaŭ menciu Homeron, Herodoton, egiptajn tekstojn antaŭ- kaj post-kristajn. Oni multe hipotezis pri la ĝusta loko de Atlantido. Ĉiuj depostulis ĝin - eĉ pri du Atlantidoj oni parolis. Iom da geologio helpas.

La mapo de la Atlantika Oceano montras vastan plataĵon, de la Britaj Insuloj ĝis la Sudamerika marbordo, kaj sud-orienten ĝis Tristan de Cunha (nun brita arkipelago en suda Atlantiko). La subakvigita kontinento superelstaras je 9 000 futoj la atlantikajn profundaĵojn kaj atingas la oceanan surfacon ĉe Acoroj kaj Tristan de Cunha. Tio estis la spino de la praa kontinento, kiu etendiĝis laŭ la tuta surfaco de la Atlantika Oceano kaj kies restaĵoj konsistigas Eŭropon kaj Amerikon. La plej grandaj profundaĵoj (3 500 klaftoj) estis unue subakvigitaĵoj oriente kaj okcidente de la centra montoĉeno. Kelkaj kulminoj nuntempe estas super la marnivelo. La plejparto de Atlantido kuŝas kelkcentojn da klaftoj sub la Atlantika Oceano. La ligoĉenoj signas la vojon iritan de la bestoj de kontinento al kontinento. Kaj same vojiradis la nigruloj de Afriko al Ameriko kaj reen. Dum mioceno do (t.e. dum la kvara kaj lasta periodo de la terciara erao), tiu malaperinta tero ekzistis, kunigita norde kun Hispanio, sude kun Maŭrlando, okcidente ĝis Bermudoj kaj Antilioj.

Atlantido estis subakvigita, dum la teroj, oriente kaj okcidente, estis plialtigitaĵoj. La groenlanda bordo tiel rapide subakviĝis, ke konstruaĵoj malaperis - kaj same pri Suda Karolino kaj Georgio -

dum Nord-Eŭropo kaj Sud-Amerika marbordo suprenaltiĝis.

Kiam la montoĉenoj ligis la kontinentojn, ili malhelpis, ke la tropikaj varmaj akvoj venu norden. Ne ekzistis la golfofluo. La fermita oceano, kiu banis la nord-eŭropajn bordojn estis malvarmega. Tiel estis dum la glacia erao. Kiam Atlantido subakviĝis, la varmaj tropikaj akvoj alfluegis norden kaj glacio Eŭropon kovranta fandiĝis. La golfofluo alprenis vojon, kiu rondiris la insulon Atlantido. La tuta atlantida kontinento estis tegita de vulkanaj sedimentoj: postrestanta ŝlimo.

Cetere esplorado de la ambaŭflanka oceana platformo evidentigas, ke riveregoj, kiuj enfluis en la atlantikan oceanon nun fluadas suboceane, kelkmil futojn profunde. Kiam tiu platformo estis grundo firma, la riveregoj fluadis sub libera ĉielo. Ankaŭ evidentiĝas, ke la acora subgrundo konsistas el lafa bazalto, kiu estis vitrigita sub libera ĉielo, sub aerpremo, dum lafoj ja ne vitriĝas, sed kristaliĝas sub la maro. La akutaj anguloj de la specimenoj montras, ke la lafo subakviĝis post malvarmiĝo. Cetere bone konservitaj estas la specimenoj, dum estas konate, ke lafo malkomponiĝas en la daŭro de 15 000 jaroj.

Kelkajn strangaĵojn pri plantoj kaj bestoj la ĉi-supra esploro povus klarigi.

Ne arbo estas bananujo, sed herbo, iaspeca monstra lilio, senligna, nur el folioj konsistanta. Ĝi portas spadikojn inter 25 ĝis 30 kilogramoj. Nur hombredado povas klarigi ĝian aspekton. Bredita bananujo ekzistis en Ameriko, kiam la Hispanoj elŝipiĝis, dum laŭnaturaj specimenoj tie ja ne ekzistis. Importitaj do estis la bananujoj. Kaj se veras la atlantida hipotezo, la duon-insulo, kie la breditaj plantoj kreskis estis nenio alia, krom la daŭre superelstarantaj montopintoj de praa subakvigita kontinento.

Pri bestoj nun. Iam estis ĉevaloj en Ameriko; sed ili malaperis kaj

ilin reenlandigis la Hispanoj. Pri elefantoj Platono parolas. Da ili estis en Ameriko, sed ne en la malnova kontinento, tute ne. Kiel ili estus atingintaj Afrikon, se ne estintus intera tero? Ĉi tiun kontinenton ankaŭ ne memoras la birdoj, kiuj ĉiujare migras kaj transflugas la oceanon de Eŭropo al Sud-Ameriko? Ili rondoflugas laŭ larĝaj cirkloj, kvazaŭ ili serĉus en la acora regiono, ĉu nutraĵon, ĉu taŭgan grundon por surteriĝi. Ĉiun duan jaron angiloj forlasas sian marĉon frajonte en la sargasa maro, proksime al la Bermudaj Insuloj. Ili supozeble sekvas malaperintan riveregon, en malaperinta kontinento fluintan. Parto de la sargasa maro kaŝas abismajn ebenaĵojn, dum alia, la submarajn bermudajn montojn. Eble estis la Acoroj la montoj de tiu subakvigita tero, montoj dispecigitaj de gigantaj vulkanaj sismoj. Ĉirkaŭe troveblas vastaj lafofluo kaj tio ilustras la aserton de Platono: "en la daŭro de unu diurno egaj tertremoj kaj inundoj enabismigis la insulon".

Ni venu al la homoj kaj popoloj. Ambaŭ Vaskoj kaj Berberoj - kies lingvoj prezentas similaĵojn - pretendas, ke ili devenas de Atlantido. Sed pli mirigas la kazo de la kanariaj enloĝantoj en la tempo, kiam la hispanaj konkerintoj ilin malkovris (kaj buĉadis). Ili prezentis strangan miksaĵon el civiliziteco kaj krudeco. Sama reĝosistemo, kiel en Atlantido. Ili adoris la sunon, al ĝi konsekris pastrojn. Ili mumiigis siajn mortintojn; konstruis domojn per ŝtonoj perfekte kunigitaj, kun muroj blanke, ruĝe kaj nigre farbitaj. Ili irigaciis dank'al kanalsistemo, havis rondoformajn fortikaĵojn; ili fabrikis ŝtonlampojn, havis alfabeton, poezion kaj literaturon. La popollingvo (nun malaperinta) similis la berberan.

Platono parolas pri rokoj blankaj, nigraj kaj ruĝaj, kaj rokoj tiukoloraj troveblas en Acoroj kaj Kanariaj Insuloj. Varmaj kaj malvarmaj akvofontoj ankoraŭ ekzistas

en Acoroj. Tiuj insuloj aspektas, kiel subakvigataj teroj kun altaj nigraj montoj rekte stariĝantaj el la maro. En Corvo (la plej okcidenta insulo) oni malkovris statuon de rajdanto, kies brako signis okcidenten. La enloĝantoj ĝin nomis "cates", kio nenion signifas, ĉu en la hispana, ĉu en la portugala, sed pensigas pri keĉua esprimo signifanta " sekvu la sagon ".

Se alian sagon ni sekvos, ni venos al nia Bretonio, en departemento Morbihan kaj ties ĉefurbo Vannes. La prapatrojn de la tieaj enloĝantoj Julio Cezaro nomis "Venetii" en sia "De bello gallico". Ne kelta estis tiu popolo, sed keltigita. Maristoj estis tiuj Venet-oj, dum en la kelta mitologio ne ekzistas dio de l'oceano.(Estas sciata, ke la Keltoj venis el centra Eŭropo). Tiuj maremuloj vivis vivon similan al tiu de la Venecianoj, borde de Adriatiko. Lertaj maristoj kaj komercistoj, ili sin establis sur marĉaj lokoj, proksime al la alta maro. Samkiel la Venecianoj, per siaj kanaloj ili sin ŝirmis, kaj de atakoj el la kontinento, kaj de la ventegoj.

Kaj ilia vivo similis tiun priskribitan de Platono. La tiel-nomataj "Keltoj de l'oceano" adoris la Dioskurojn, filojn de Zeŭso kaj Leda, protektantojn de la ŝipistoj. Tiuj dioj ankaŭ zorgis pri la ĉevalaj vetkuroj. Kaj Platono raportas, ke ĉevalaj vetkuroj rolis en la kulto, kiun oni celebris honore al la diaĵoj en la insulo. Notindas, ke en Gaŭlo nenian spuron oni trovas de tiu kulto al la Dioskuroj.

Se oni senmanke observas la priskribon de Platono, oni desegnas tri samcentrajn cirklojn -jen la tri remparzonoj-; meze oni aldonu krucon signantan la kanalojn. Tio estas la figuro de la kelta kruco -ankaŭ la plano de Stonehenge, la grandproportia megalita templo kun ties tri konstruperiodoj.

(daŭrigota)

Simone BONIOL

Laste aperis

Okaze de la centa datreveno de Julio Baghy estis reeldonitaj verkaĵoj de tiu verkisto: la romanoj "Viktimoj" kaj ĝia sekvo "Sur sanga tero", kaj ankaŭ du poemoj: "Preter la vivo" kaj "Pilgrimo".

Libroj por la ŝatantoj: du belegaj libroj pri persaj poetoj "Hafez en 30 lingvoj" kaj "Omar Kajjam en 30 lingvoj" (126 kaj 198 gld ĉe UEA).

En la literatura serio de "Franca esperantisto" aperis tradukoj de "La legendo de Sankta Juliano Helpema" de G. Flaubert, kaj "La revadoj de soleca promenanto" de J.J. Rousseau.

Kasedo "Skeĉoj" de S. Mac Gill. Ĝoja prezentado por progresantoj

Muzikaj kasedoj de Nikolin': "Nur per amo" (malnovaj francaj kantoj kun akompano de gurdo), "Invito al ĝojo".

De la juna, tre profesia grupo "Kajto", samtitola kasedo kun teksta kajereto.

Pli klasika: Saskia Veen (harpo) kaj Edward Hoepelman (tenoro) prezentas melodiojn de famaj komponistoj kaj poetoj en esperanto kaj en naciaj lingvoj sur la alia flanko.

"La Mesio" de Haendel kun valoraj solistoj kaj hungara koruso.

LA SEKRETOJ DE LA SAHARO

Jam de longe oni sciis, ke la Saharo ne ĉiam estis seka dezerto, kia ĝi estas nun. Malgraŭ sia nomo "Saharo", kiu signifas malmolan aŭ sablan ebenaĵon, ĉi tiu dezerto tute ne estas ebenaĵo; en ĝi estas multaj montoĉenoj, kiel la Ahaggarkaj Tassili-montaroj, kaj ankaŭ vastaj basenoj, el kiuj kelkaj kuŝas sub la marnivelo. Kiu per aviadilo veturas super la Saharo, estas ĉiam trafata de la granda reguleco, laŭ kiu la sekaj malhelkoloraj valoj tratanĉas la vastan dezerton. La tuto donas la impreson de vastega sistemo de kanaloj kaj riveroj, el kiuj kelkaj kondukas al la lago Ĉad kaj aliaj al la rivero Niger. Nur la akvo mankas. Sed miraklaj trovaĵoj pruvis ke la Saharo estis fruktodona regiono loĝata de homoj.

Jam en 1909 franca kapitano menciis desegnaĵojn trovitajn en grotoj dum ekspedicio tra la Tassilin-Azĝer-montaro, regiono loĝata de la tuaregoj. Aparte li atentigis pri desegnaĵo de bizono en ruĝa okro. Ĝi estis aparte interesa, ĉar oni trovis en la grotoj de Altamira, en Hispanio, desegnaĵojn el la glaci-epoko, inter kiuj ankaŭ estis unu de bizono en ruĝa koloro. En 1912 kaj en 1929 oni trovis grandan nombron da pentraĵoj de bestoj, homoj, scenoj de ĉasado. En 1932 kapitano Duprez surprizis la scienculojn per la komuniko, ke li trovis, en la centra parto de Tassili pentraĵojn de batalĉaroj tirataj de ĉevaloj. La ekzisto de tiuj batalĉaroj memorigis pri la skribaĵoj de la greka historiisto Herodoto, kiu priskribas la popolojn de Afriko kaj rakontas pri sovaĝa, militema popolo, la garamantoj, loĝantaj en Fezzan, parto de Libio. Sed Herodoto vivis en la kvina jarcento antaŭ Kristo kaj la pentraĵoj ŝajnis esti pli malnovaj.

Kiam unu jaron poste leŭtenanto

Brenans, sperta arkeologo, trovis sur la rokoj de Tassili multajn desegnaĵojn de ĝirafoj, antilopoj, bovoj, elefantoj kaj rinoceroj, oni komprenis, ke en tiu montara regiono ekzistis kulturo de gentoj elmortintaj jam antaŭ nememoreblaj tempoj. Maturiĝis plano ekpiedpiedaĵo kun la celo trakopii la murpentraĵojn kaj transdesegni ilin en pli malgranda skalo. Tio signifis delikatan laboron. La dua mondmilito renversis la planojn. Ili realiĝis nur en 1956 sub la gvidado de Henri Lhote.

La pejzaĝo estis kvazaŭ fabela:



la krutaj rokoj kun multaj koridoroj, trairejoj kaj vojoj donis la impreson de detruita urbo, kies enloĝantoj estis forkurintaj. Kelkaj anoj de la ekspedicio ne povis toleri la krudan vivmanieron kaj estis anstataŭigitaj per aliaj homoj. La akre malvarma vintro devigis ĉiujn retiriĝi en la fortikaĵon Ĝanet. Nur en julio 1957 la ekspedicio revenis al Parizo. Amaso da laboro estis farita: okcent desegnaĵoj, la kopioj de mil kvincent kvadratmetra murpentraĵaro estis la rezultato.

Kvankam estas fakto, ke la murpentraĵoj de Altamira (Hispanio) kaj Cro-Magnon (Francio) devenaj el la glaciepoko, estas milojn da jaroj pli malnovaj, la gravaĵo de la saharaj desegnaĵoj estas, ke la ekspedicio sukcesis fiksi la kronologian sinsekvon dum okmiljara epoko. Lhote kaj liaj kunlaborantoj havis la ideon lavi la rokmurojn en la grotoj de Ĵabbaren. Aperis longa fresko, kaj evidentiĝis, ke la gentoj, kiuj loĝis tie, simple pentris siajn artaĵojn sur jam ekzistantajn desegnaĵojn. Tiamaniere ekestis diversaj tavoloj, kiuj ebligis al la arkeologoj fari kronologian dividon. Tiel ili fiksas kvar ĉefperiodojn: 1) la periodon de la ĉasistoj, kiu komenciĝis proksimume okmil jarojn antaŭ Kristo; 2) la periodon de la bovpaŝtistoj, ekde 5 000 jaroj antaŭ Kristo; 3) la periodon de la militistoj kun batalĉaroj, aŭ la periodo de la ĉevalo, de ĉirkaŭ 1 100 jaroj antaŭ Kristo; 4) la periodon de la kamelo, kiu komenciĝis nur kelkdekojn da jaroj antaŭ nia jarkalkulo.

La periodo de la ĉasistoj, kiu daŭris kelkmil jarojn, havas mem diversajn fazojn, en kiuj en la komenco montriĝas evoluo kaj en la fino ia dekadenco. La plej malnovaj desegnaĵoj estas unukoloraj, en violnuanca okro; ili montras homojn kun rondaj, nenorme grandaj kapoj; iliaj armiloj konsistas el lanco, pafarko kaj bastono. La bestoj en tiu unua fazo, en la ŝtona epoko, estas ankoraŭ maloftaj. Oni trovis bildojn nur de elefantoj kaj de ŝafsimita besto kun grandaj kornoj.

Granda progreso estis la pêntrado en pluraj koloroj, la komenco de la dua fazo; la fono de la pentraĵoj estas plej ofte farita per flava aŭ verdflava okro, dum la konturoj de la homaj figuroj estas indikitaj per ruĝa koloro, ofte per unu linio. La homa tipo estas ankoraŭ rondkapa. La fingroj de manoj kaj piedoj ne estas desegnitaj. Aperas la rinocero kaj la antilopo.

En sekvanta fazo oni vidas, ke la kulturo tre progresis: la personoj estas tre atente desegnitaj.

ili portas zonon ĉirkaŭ la talio kaj rubandojn ĉirkaŭ brakoj kaj maleoloj. Ilia haŭto estas surpentrita kaj donas la impreson esti tatuita. Nun venas la negra tipo, dum ankaŭ la egipta influo estas videbla.

Tute en la fino de la ĉasista periodo klare montriĝas dekadenco; la desegnaĵoj fariĝas maldelikataj kaj krudaj, sendetalaj. Tipa ekzemplo de tio estas la desegnaĵo de monstra estaĵo kun alteco de ses metroj, kiun oni trovis en Ĵabbaren.

Ĉirkaŭ la jaro 5 000 antaŭ Kristo finiĝas la periodo de la ĉasistoj; kiel montriĝis el la pentraĵoj de la subaj tavoloj, novaj homgrupoj instalas sin en la regiono de Tassili, kunportantaj grandan brutaron. Komenciĝis la periodo de la bovpaŝtistoj. Laŭ la desegnaĵoj la bovoj estis elegantaj bestoj kun belegaj kornoj en la formo de liro aŭ cirklo, tipo, kiu forte similas al la tipo konata ĉe la malnovaj egiptoj. La desegnaĵoj el tiu periodo montras hom- kaj bestfigurojn de malgrandaj proporcioj, sed de trafa simileco kaj faritaj kun granda precizeco. Ĝajne ekzistas naturalista skolo en tiu tempo. Ankaŭ sovaĝaj bestoj de diversaj specoj estas bildigitaj: gazelo, ĝirafo, hipopotamo, leono, azeno, struto kaj eĉ fiŝoj. Ĉi tiu diversspeca faŭno pruvas, ke tie estis multa herbo kaj akvo; precipe la ekzisto de akvo tie estas ankaŭ konfirmita per desegnaĵo, kiu prezentas indiĝenojn ĉasantajn hipopotamon, dum ili sidas en pirogo.

Ĉi tiuj bovpaŝtistoj certe devis esti migrantoj en granda stilo; oni supozas, ke ili daŭrigis ĝis la Atlantika Oceano, veninte el la sud-oriento kaj oriento. Ke ili venis el la sud-oriento, oni povas pruvi per desegnaĵoj en natura grandeco de junaj knabinoj, kies profiloj kaj beleco tute akordiĝas kun tiuj de la popolo ĉe la Supra Nilo. Krome ses diversaj desegnaĵoj sur la rokmuroj de Tassili prezentas egiptajn ŝipojn. Jen pruvo, ke ili venis ankaŭ el la oriento kaj havis intiman kontakton kun la egipta civilizacio.

Estas certa fakto, ke ĉi tiuj ovpaŝtistoj siavice estis forpelitaj de militistoj, kiuj alvenis per evaljungitaj veturiloj kaj kaŭzis en tiu regiono veran revolucion. Antaŭe oni pensis, ke tiuj militistoj rilatis al la garamantoj, priskribitaj de Herodoto, sed la rapida galopo de la ĉevaloj sur la multaj desegnaĵoj trovitaj de la ekspedicio de Lhote, multe similis al tiuj, kiujn oni antaŭe trovis sur pentraĵoj de la micena arto sur la insulo Kreto. Oni scias, ke la micenanoj klopodis invadi Egiption en la dekdua jarcento antaŭ Kristo. Ili intencis iri al Cirenio kaj tial alboridiĝis en la kurbo de la Malgranda Sirto, sed la invado ne sukcesis. Do oni povas facile kompreni, ke ili poste surbordidiĝis ĉe Oae, la nuna Tripoliso, kiu situas ĉe la kurbo de la Granda Sirto.

La nun trovitaj desegnaĵoj pruvas, ke ĉi tiuj micenanoj eniris en la landon ĉe Oae kaj alvenis en la Tassili-montaron. De tie ili daŭrigis al Centra Afriko. Kun malmultaj penoj Henri Lhote povis konstati kun sufiĉe granda certeco, kiel tiuj kuraĝaj micenanoj, evitante la altajn montoĉenojn kaj irante de unu oazo al alia, per siaj "veturiloj" travojaĝis la Saharon, de la nuna loko Tripoliso ĝis la rivero Nigero. Nova periodo komenciĝis en la Tassili-montaro, kiu daŭris ĝis nur malmultaj jaroj antaŭ nia jarkalkulo.

Ĉu la apero de la kamelo signifis ke la sabliĝo de la Saharo jam komenciĝis? Sed tiam ni estas en la komenco de la historio. La trovo de la murpentraĵoj havas tre gravan signifon, kiun ilustras la fakto, ke profesoro Monod, kiu antaŭ la milito gvidis la serĉlaboron en la Tassili-montaro, povis fari nur la simplan dividon: periodo de antaŭ la kamelo kaj periodo de post la apero de la kamelo.

Aludante al la supraj plej novaj trovaĵoj la reprezentanto de la Scienca Akademio dum la jarkunveno de la Instituto de Francio deklaris, ke "la lastaj trovaĵoj rajtigas al la serioza konjekto, ke la unua homo vivis ne, kiel oni ĉiam opiniis, en Malgranda Azio, sed en centra Afriko".

La rokpentraĵoj de la Tassili-montaro levis iomete la vualon de la mistero, kiu kovris la historion de la homa gento.

R. de Wijkerslooth

El artikolo aperinta en la revuo "La Praktiko" en la jaro 1958



La franca revolucio kaj Germanujo

Dum la franca revolucio, Germanujo kiel unuigita lando ne ekzistis. Frederiko la Granda (1740-86) organizis la prusan ŝtaton. Li atingis la "Germanan Ligon de Princoj", kies kontrakto finiĝis en 1785.

Kiel aspektis la revolucio ĉe la tiamaj germanoj? Hegel, filozofo, salutis ĝin, kiel "belegan sunleviĝon". Ĝis sia morto, en 1831, je ĉiu 14-a de julio, li trinkis ĉampanvinon memore al la revolucio. Schiller, poeto, entuziasme solenis la ekleviĝon. Alia poeto, Hölderl, verkis "Himnon al libereco" kaj "Himnon al la homaro". Schelling, filozofo, en la universitato de Tübingen, salutis tiun eventon. Forster kaj Görres fondis respublikon en Mainz laŭ franca revolucia modelo! Schlegel male juĝis la revolucion "fajra forno de l'detruo". Disputoj inter Germanoj pri la franca revolucio daŭras ĝis nun.

Pro la nuligo de la eklezia potenco en Francio, pro la abolicio de la nobelaj privilegioj, pro la malpermeso de institucioj ekzistantaj de jarcentoj, ekestis problemoj ne nur en Germanujo sed en aliaj eŭropaj landoj.

Entuziasmo ekestis ĉe la klera burĝaro. Vojaĝantoj raportis letere el Parizo pri la gravaj renversiĝoj. Herder, poeto kaj filozofo, verkis la jenan poemon okaze de la Festo de la Federacio en 1790: "Ĉirkaŭ la alta altaro vi vidas la Francojn konsekri fratojn je fratoj, homojn je homoj. Festo sankta, dieca, 14-an de julio, la nepoj foje vin benos!" Schiller, Klopstock, Campe pro sia engaĝiĝo estis nomumitaj honorcivitanoj de l'Franca Respubliko en 1792. Multaj kleruloj ne kredis je ebla transigo de l'franca modelo en Germanujon. La reformoj de Frederiko II-a en Prusujo kaj de

Jozefo II-a en Aŭstrujo elvokis trompajn esperojn al reformebleco de l'absolutismo. Tamen, Libereco kaj Egaleco, idealoj de la nova franca respubliko, iĝis batalaj nocioj por diversaj politikaj kaj ekonomiaj interesoj en Germanujo. La burĝaro utiligis tiujn nociojn tutsame kiel la metiistoj kaj servutaj kamparanoj. Studentoj uzis ilin en la batala akiro de opinilibereco. Filo de pastoro Reinhard el Stuttgart estis instruisto en Bordeaux. Fervora ano de l' respublika klubo li aktivis en Parizo kaj eĉ iĝis ministro pri eksteraj aferoj en la Franca Respubliko en la 2-a jaro de la revolucio. Samjare Grafo Ludener el Bavarujo iĝis marŝalo de Francujo, komandis la Armeon de Rejno, sed tamen mortis sub la gilotino...

1793: en Mainz ekestas la unua respubliko sur germana teritorio. Timo regis ĉe la imperiestro en Vieno kaj ĉe Leopoldo II-a, ankaŭ ĉe germanaj dukoj kaj grafoj. En la 3a jaro de la revolucio, ili organizas koalicion kontraŭ la revolucio. Partoprenis francaj elmigrintoj. Sekve Francujo deklaris militon al Aŭstrujo kaj Prusujo deklaras militon al Francujo. Duko de Braunschweig apelacias al la Parizanoj por ke ili redonu al Ludoviko XVIa plenajn liberecon kaj potencon.. En la 4-a jaro de la revolucio, Francujo deklaras militon al Anglujo, Nederlando kaj Hispanujo. La franca volontulo armeo, primokata, venkis kaj bridis la nur dresitajn armeojn de l'eŭropa koalicio. La ekzekuto de Ludoviko XVI-a kaŭzis opinirenversiĝon en Germanujo.

5-a jaro de la revolucio: ripeta alvoko al la germana nacio deklaras: "La Frankoj estas nevenkeblaj, ĉar ili batalas por libereco kaj homaj rajtoj. La homaro, kiu defendas la nacion de la Frankoj, staras ĉe ĝia flanko kaj helpas ĝin venki. Aŭstrujo perdis sian Nederlandon, eble por ĉiam. La loĝantoj de Belgujo ĝoje akceptas la Frankojn. La nacio de la Frankoj estas libera; kiel vi povas riski kontraŭstaron? Tremu, tiranoj! La popolo vekiga! Kruela estos

Ĝia ribelo se vi ĝin devigos daŭrigi la militon kontraŭ la nacio de l'Frankoj, kontraŭ libereco kaj homaj rajtoj!"

Beethoven, unue arda admiranto de konsulo Bonaparte, dediĉis al li sian simfonion "Eroica", sed li ŝiris la dediĉfolion, kiam Bonaparte iĝis imperiestro de la Francoj kaj kolere ekkriis: "Nun ankaŭ li piedpuŝos la homajn rajtojn, li estos gloravida kaj iĝos tirano!" Tamen li restis arda defendanto de libereco kaj homaranismo. Tion oni klare vidas en lia 9-a simfonio, kies fino estas la poemo de Schiller: "Brakumataj milionoj, jenan kison al tutmond'". Ankaŭ Goethe defendis la francan revolucion. Akvarelo lia el 1792 montras la arbon de Libereco ornamitan per la revolucia kokardo. Vira figuro montras al ŝildo: "Pasantoj, tiu tero estas libera". Jam antaŭ la sturmo al la Bastille, en dramo, la juna Schiller postulis de reganto: "Permesu liberon de la pensoj". Lia kanto al la ĝojo, fine de la 9-a simfonio de Beethoven, unue nomiĝis "Kanto al libereco".

Kiam en 1792 la francaj taĉmentoj okupis Mainz, Forster defendis la francan respublikon kaj unuafoje nomis Rejnnon "natura limo" de Francujo. Li celis fondi la "Rejna-Germanan Respublikon" kun aliĝo al Francujo. Post publikaj balotoj, oni proklamis la unuan germanan respublikon Mainz kun kvaronmiliono da civitanoj la 14-an de marto 1793. Ĝi estis la unua germana komunumo en kiu validis tiuj homaj rajtoj, bazo de la amerika kaj franca konstitucioj. La 25-an de marto Forster gvidis delegacion al Parizo por peti la aliĝon de la juna respubliko al Francujo. Pro la ekzekuto de Ludoviko XVI-a kaj la deklaro de milito al Anglujo, koalicio minacas Francujon. Mainz estas sieĝata. Forster devas resti en Parizo, kie li mortas la postan jaron. Ano de la germana delegacio, Adam Lux, atente observis la eventojn en Parizo. Post senresponda letero al la deputitoj li ellaboras memorandon en kiu li nomas la Jakobenojn friponoj kaj perfiduloj. En novembro 1793 li

iras al la gilotino, nur 27-jara.

Iu germano ludis aparte gravan rolon en la revolucio, Schmidt. Li ofte gastis ĉe la ekzekutisto Samson. Schmidt prezentis al li desegnon pri la gilotino de Dro Guillotin, kiu insistis pri la sendolora morto. Schmidt estis ne nur inventisto sed bona komercisto: li sekurigis al si la patentojn de la "Razilo de l'Nacio". Ĉiu el la 83 departementoj bezonis almenaŭ unu gilotino, kiu kostis 3 000 frankojn. Bona negoco! Ĝis la fino de la revolucio falis 14 000 kapoj... kaj Schmidt mortis en sia lito 22 jarojn poste.

La franca revolucio metis en grandaj partoj de Germanujo decidigajn fundamentojn por modernigo de administrado, juro, ekonomio, kun gravaj konsekvencoj por la sociaj kaj kulturaj rilatoj. La civitanaro postulis aktivan partoprenon en la politika vivo. La ekzemplo de la franca respubliko donis al la germana historio ideojn pri la evoluo de politikaj movadoj kaj partioj. La demokratoj en 1848 kaj la social-demokratoj de l'imperio, post la proklamo de Reich en 1871, orientiĝis laŭ la atingoj de la franca revolucio. En 1889 nur la germana laborista movado solenis la jubileon de l'sturmo al la Bastille. La germanaj demokratoj en ekzilo dum la nazia epoko sin apogis sur la politika programo de la franca revolucio.

La franca revolucio metis finon al malŝparemo de l'kortego, al privilegioj de l'nobeloj, al koruptado en la oficoj, al la avido al posedo fare de l'Eklezio, la popolo venkis. En tio kuŝas la signifo de la revolucio ne nur por Francujo, sed ankaŭ por ĉiuj eŭropaj landoj, inkluzive Germanio.

El prelego farita de

HUGO RÖLLINGER (Gresillon 1989)

PAĜO DE LA GEKNABOJ

Kruĉo-Palaceto

Veturis vilaĝano; li veturigis potojn kaj kruĉojn al la foiro. Dum la irado li perdis grandan kruĉon, kaj ne rimarkis tion.

Kuŝas kruĉo apud la vojo; preterflugas Muŝo tiun palaceton bonegan por kio ajn vi volas. Ĝi rampetis en ĝin kaj ekloĝis tie.

Alflugas Kulo: "Palaco-palaceto, kiu loĝas en la palaco?" - "Mi, Muŝo-Ĉiontuŝo; sed kiu estas vi?" - "Mi estas kulo-Zumulo" - "Venu loĝi kun mi".

Ili vivas unu tagon kaj du; alkuras Museto, frap! frap! per la vosteto: "Palaco-palaceto, kiu loĝas ĉi tie?" - "Muŝo-Ĉiontuŝo kaj Kulo-Zumulo; sed vi, kiu vi estas?" - "Mi estas Muso-Nazokonuso." - "Loĝu kun ni!".

Ili vivis triope; tamen restis ankoraŭ spaco. Alsaltas Rano: "Palaco-palaceto, kiu loĝas ĉi tie?" - "Muŝo-Ĉiontuŝo, Kulo-Zumulo kaj Muso-Nazokonuso; sed vi, kiu vi estas?" - "Mi estas Rano-Marĉano." - "Saltetu al ni; da spaco estas sufiĉe!"

Ili ekvivis kvarope; vivas vivadas; alkuras la Straba Leporeto: "Palaco-palaceto, kiu en la palaco loĝas?" - "Muŝo-Ĉiontuŝo, Kulo-Zumulo, Muso-Nazokonuso kaj Rano-Marĉano; sed vi, kiu vi estas?" - "Mi estas Leporo-Timkoro." - "Loĝu kun ni!"

Ili ekvivis kvinope; vivas, vivadas; alkuras Vulpeto: "Palaco-palaceto, kiu estas en la palaceto? Aŭdigu vian voĉon." - "Muŝo-Ĉiontuŝo, Kulo-Zumulo, Muso-Nazokonuso, Rano-Marĉano, Leporo-Timkoro; sed vi, kiu vi estas?" - "Mi estas Vulpo-Multkupulo." - "Loĝu kun ni!"

Enrampis ankaŭ la Vulpo en la palaceton. Ili ekvivis sesope;


vivas, vivadas; alvenas Lupo, ĉirkaŭrigardadas, voston subtiradas: "Kiu estas en la palaco?" - "Muŝo-Ĉiontuŝo, Kulo-Zumulo, Muso-Nazokonuso, Rano-Marĉano, Leporo-Timkoro, Vulpo-Multkupulo; sed vi, kiu vi estas?" - "Mi estas Lupo-Kruelokupo." - "Loĝu kun ni!"

Enrampis ankaŭ la Lupo en la palacon. Ili ekvivis sepope; vivas, vivadas. Almarŝegas Ursego-Grandpiedego; en la arbaro seka branĉaĵo kraketis, kaj krakas la pinoj kaj tremoloj. Kaj sonas voĉego: "Palaco-palaceto, kiu en la palaco loĝas?" - "Muŝo-Ĉiontuŝo, Kulo-Zumulo, Muso-Nazokonuso, Rano-Marĉano, Leporo-Timkoro, Vulpo-Multkupulo, Lupo-Kruelokupo; sed vi, kiu vi estas?" - "Mi estas Marŝegulo-ĉiujn-vin-Dispremulo!"

Kaj la Urso sidiĝis sur la kruĉon; ekkraketis la palaco, kaj ĝin dispremis la Malrekt piedulo kaj ĉiujn ĝiajn loĝantojn.

Laŭ rusa populara fabelo

Romano Frenkel



MONTE KRISTO

Alexandre DUMAS

(Sekvo)

Traduko de R. Dupuis

Je cent paŝoj de la loko, kie Danglars kaj Caderousse, rigardante al la horizonto kaj ŝtelaŭskultante, trinkis la ŝaŭman vinon de La Malue, staras malantaŭ altaĵo bruligita de la suno kaj nudigita de la vento, vilaĝo nomata "La Katalunoj". Foje mistera kolonio forveturis el Hispanio kaj alboriĝis al la terlanga, kiun ĝi ankoraŭ okupis. Neniu sciis precize de kie ĝi venis nek komprenis ĝian lingvon. Unu el la ĉefoj, kiu parolis la provencan dialekton, petis la komunumon Marseille cedi al ĝi tiun sekan, senfruktan promontoron, sur kiun tiuj homoj estis ĵus tirintaj siajn barkojn, kiel la maristoj de l'antikva tempo. Ili akiris la terpecon kaj tri monatojn poste staris domaro ĉirkaŭ tiuj dekdu aŭ dekkvin ŝipetoj alportintaj siajn mar-ciganojn. Tiu strange kaj pitoreske konstruita vilaĝo, duone maŭra kaj duone hispana, estas nun loĝata de la idoj de tiuj alvenintoj...

Bela junulino kun haroj same nigraj, kiel agato kaj okuloj same veluraj, kiel tiuj de gazelo, staris dorsapoge al muro kaj ĉifis inter siaj delikataj fingroj senkulpan erikbranĉeton, kies florojn ŝi deŝiris kaj fallasis sur la grundon. Ĝiaj brakoj nudaj ĝiskubute, brakoj brunaj, kvazaŭ modelitaj laŭ tiuj de la Venus-statuo en Arles, tremis pro maltrankvilo kvazaŭ febra; kaj ŝi batetis la teron per piedo fleksebla. Je tri paŝoj antaŭ ŝi, sidante sur seĝo, kiun li nerveze balancetis, alta knabo proksimume dudek-du jara, rigardis ŝin kun mieno, kiu montris maltrankvilon kaj malkontenton. "Aŭskultu, Mercedes", diris la junulo, "baldaŭ venos Pasko, la tempo de l'geedziĝoj; donu al mi vian respondon! Centfoje mi respondis al vi, Fernand; vere strange, ke vi ankoraŭ min

demandas!" - "Ripetu, ripetu do, ankoraŭ, por ke mi tion kredu. Diru al mi centan fojon, ke vi rifuzas mian amon; klare komprenigu al mi, ke mia vivo, mia morto estas por vi sensignifaj! Dio mia! Dek jarojn mi revis fariĝi via edzo, kaj nun mi perdas vin, Mercedes, mi perdas la nuran celon de mia vivo!" - "Sed, mi neniam kuraĝigis tiun esperon, Fernand", respondis la junulino. "Mi eĉ ne unufoje frivoletis al vi. Mi ĉiam diris, "mi amas vin, kiel fraton, sed neniam petu de mi pli ol fratinan amikecon, ĉar mian koron havas aliulo. Ĉu ne tiel Fernand?" - "Ho, tion mi scias, Mercedes; jes, vi estis kruele senkaŝa al mi; sed ne forgesu, ke interna leĝo devigas la Katalunojn geedziĝi inter si!" - "Vi eraras. Ne estas leĝo sed kutimo tute simpla; kaj tiu kutimo ne favorigas vin, Fernand. Baldaŭ vi ricevos alvokon al soldatiĝo. Tiam kion vi faros el mi, kiu estas orfino kompatinda, malĝoja, malriĉa, kies tuta havaĵo konsistas el ruiniĝanta kabano en kiu pendas kelkaj eluzitaj retoj, mizera heredaĵo de mia patro al mia patrino kaj de ŝi al mi. Pensu, ke de post ŝia morto mi vivtenas preskaŭ nur el bonkoraĵoj. Vi kelkfoje ŝajnigas mian utilon por rajtigi vin doni al mi parton de via fiŝkaptaĵo. Mi konsentas, ĉar vi estas filo de frato de mia patro, ĉar ni kune kreskis, kaj ĉefe pro tio, ke vi ĉagreniĝus se mi rifuzus. Sed mi bone sentas, ke la fiŝoj, kiujn mi vendas por aĉeti ŝpinkanabon, mi bone sentas, Fernand, ke ili estas almozoj." - "Tute ne gravas. Kiel ajn malriĉa kaj izolita vi estas, kia vi estas, vi pli plaĉas al mi ol filino de l'plej fieraj ŝipekipisto aŭ de l'plej riĉa bankisto. Ĉar kion mi bezonas, kiel fiŝisto? Honestan edzinon, kiu estu lerta mastrino. Kie mi trovos pli bonan ol vi, ambaŭrilate?" - "Fernand, oni fariĝas malbona mastrino, kaj ne povas garantii daŭran honestecon, kiam oni amas alian viron. Sufiĉu mia amikeco. Mi ne povas promesi pli ol mi povas sendube doni." - "Mi komprenas", diris Fernand; vi paciencie elportas vian mizeron sed vi timas la mian.

Sed, Mercedes, se vi amas min mi provos riĉiĝi; vi aŭguru mian bonŝancon; tiam mi prosperegos; mi povas progresigi mian fiŝistan metion, eniri kontoron, kiel komizo, mi eĉ povas fariĝi komercisto!" - "Nenion tian vi rajtas provi, Fernand; vi estas soldato, kaj vi restas en "La Katalunoj" nur pro tio, ke la lando ne militas. Do, restu fiŝkaptisto; ne faru revojn, kiuj poste farus la realon despli terura. Vin kontentigu mia amikeco, ĉar doni pli al vi mi ne povas." - "Nu, vi pravas, Mercedes; mi estu maristo. Anstataŭ la kostumo de niaj antaŭuloj, kiujn vi malestimas, mi surmetu lakitan ĉapelon, ĉemizon kun strioj, bluan jakon kun ankretoj sur la butonoj. Ĉu kiu volas plaĉi al vi, ne tiel vestiĝu?" - "Kion vi aludas?" demandis Mercedes kun fiera rigardo; "kion vi aludas? Mi ne komprenas vin." - "Mi aludas, ke vi estas tiel severa kaj kruela al mi, ĉar vi atendas iun tiel vestitan. Sed tiu, kiun vi atendas estas eble nefidinda, aŭ se li ne tia estas, la maro tia estas." - "Fernand," ekkriis Mercedes, "mi kredis vin bonkora sed mi eraris! Vi malbonkore akriĝas vian ĵaluzon alvokante dian koleron! Nu, jes, mi ne volas kaŝi, ke mi amas kaj atendas, kiun vi aludas, kaj se li ne revenos, anstataŭ deklari lin nefidinda, kiel vi imagas, mi diros, ke li mortis en fidelo al mi." La juna kataluno furioze gestis. "Mi komprenas vin, Fernand: vi koleras kontraŭ li, ĉar mi ne estas via; al lia ponardo vi eble volas oponi vian katalunan tranĉilon! Sed kio rezultos? Venkita, vi perdos mian amikecon; venkinta vi frontos mian malamikecon. Provoki viron ne estas la plej bona rimedo plaĉi al la virino, kiu amas lin. Forpelu tiajn pensojn. Daŭre konsideru min via amikino, via fratino. Cetere", ŝi aldonis kun larmovualiĝintaj okuloj, "kiu scias? Vi ĵus prave diris, ke la maro estas nefidinda; kaj jam de kvar monatoj li estas for; dum tiu tempo ekestis pluraj ŝtormoj!"

Fernand restis senmova; li ne provis forigi la larmojn, kiuj

nun ruliĝis sur ŝiaj vangoj, kvankam li povus doni por ĉiu el tiuj larmoj glason plenan de sia sango. Tiuj larmoj fluis pro aliulo! Li sin levis, momenton paŝis tien kaj reen en la kabano kaj fine staris antaŭ Mercedes kun pugnaj manoj kaj mallumaj okuloj. "Nu, Mercedes", li diris, "ankoraŭfoje respondu al mi: ĉu nepre decidite?" - "Mi amas Edmond Dantes", tranĉe diris la junulino, "kaj neniu alia ol li estos mia edzo!" - "Ĉu vi ĉiam amos lin?" - "Mian tutan vivon."

Fernand mallevis la kapon, kiel viro senkuraĝigita, eligis ĝemon preskaŭ stertoran kaj subite, relevante la frunton, kun dentoj kunpremitaj kaj naztruoj larĝiĝintaj: "Sed, se li mortis?" - "Se li mortis, mortos ankaŭ mi." - "Se li forgesas vin?"

"Mercedes!" vokis ĝoja voĉo ekstere, Mercedes!". "Ha!" ekkriis la junulino, ĝojkriante kaj amsaltante, "vidu, ke li ne forgesis min! Jen li!" Kaj ŝi rapidis al la pordo, kiun ŝi malfermis: "Jen mi estas, Edmond; jen, mi estas!"

Fernand, pala kaj tremanta, paŝis malantaŭen kvazaŭ vojaĝanto, kiu subite renkontas serpenton, kaj trovinte sian seĝon sidfalas. Edmond kaj Mercedes staris en la brakoj unu de la alia. La arda suno de Marseille elĵetis sur ilin tra la pordo malfermita sian fortan lumon. Unue ili vidis nenion ĉirkaŭ si. Senlima feliĉo tenis ilin for de l'mondo kaj ili diris tiajn frazpecetojn, kiuj esprimas ĝojon tiel grandan, ke ili ŝajnas esti dolor-esprimoj. Subite Edmond rimarkis la malhelan figuron de Fernand, kiu aspektis pala kaj minaca en la ombro. Eble nekonscie, la juna kataluno tenis sian manon sur la tranĉilo, kiun li portis ĉe sia zono. "Pardonu" diris Dantes, "kiu estas tiu sinjoro?" - "Mia amiko, kvazaŭ mia frato. Ankaŭ via amiko li estos" respondis Mercedes. Dantes etendis sian manon, sed Fernand restis muta kaj senmova, kiel statuo.

(daŭrigota)


POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAUA ENIGMO

Slosilvortoj: Venezuelo, viziero, Transilvanio,
Pakistano, Skarlatino, Svedujo, skeptikulo,
ĉefepiskopo, Sudetoj, definitive, vulturo.

Trovota sentenco: Ne tiu vivo estas riĉa vivo,
kiu estas plena de plezurøj, sed tiu vivo,
kiu estas plena de oferoj.

NOVA ENIGMO



Horizontale: 1-Florfasko - 4-Duonnegro - 9-Malsola viro - 10-Sankta nombro -
12-Laŭtege paroli - 13-Ŝakfigureto - 16-Rusa imperiestro - 17-Konifera
arbo - 23-Manĝata riverfiŝo - 25-Balanceti infaneton - 26-Koloro -
27-Orientazia laboristo - 28-Agata juvelŝtono - 29-Mondmarego.

Vertikale: 1 Mallarĝkola vazo - 2-Zigzage ŝipveturi - 3-Mondestro - 5-
Sovaĝa bovo - 6-Ŝipfiksilo - 7-Sengepatra knabino - 8-Suŝmiraĵo -
10-Trankaĵo - 11-malvira - 14-Movi sin al alia loko - 15-Tre alta nombro -
18- Grandega frukto - 19-Artefarita hararo - 20-Kampa saltinsekto -
21-Malplafono - 22-Prizorgi malsanulon - 24-Koloro.

LA VIVO EN GRESILLON

ANTAU 40 JAROJ ...

Jes, jam 40 jaroj pasis de post la unua "cirkulero al la esperantistoj", sendita de Henri Micard. Ŝajnas al ni interese memori pri tiu unua paŝo al la nun fariĝinta "monumento de Esperantujo".

Iun tagon de printempo 1951 gesinjoroj Micard babilis kun geamikoj. Ili rakontis, kiom malfacile estis trovi lokon por organizi la "Somerlernejon". Efektive ŝajnis tiam, ke neniu urbo povos gastigi G.E.E. (Grupo de Esperantistaj Edukistoj) dum la venonta somero. "Sed, respondis unu el la amikoj, kial vi ĉiujare serĉadas novan lokon? Estas nun vendota ĉi tie, en Sablé-sur-Sarthe, domo sufiĉe granda. Aĉetu ĝin. Tio solvos viajn problemojn." Tiam naskiĝis nova ideo: Esperanto-Domo posedata de la Esperantistoj. La traktadoj tuj komenciĝis kaj Micard sendis cirkuleron al 150 esperantistaj amikoj.

Cirkulero al la esperantistoj

" Esperantisto skribis al mi: via Somerlernejo estas bona ideo; sed kial ne organizi plurajn: Jes, kial? La GEE-anoj konas la respondon al tiu demando. Ili scias, ke la organizado de somerlernejo fariĝas pli kaj pli malfacila, ĉar ni ne havas propran domon, beletan, en agrabla regiono... Vi diros, ke tio estas revo. Sed tiu hieraŭa kaj hodiaŭa revo povas iĝi morgaŭa realaĵo se ni, ĉiuj kune volas atingi la celon... Kion oni postulas, kiam oni ĉeestas esperantistan renkonton? Unue esperantistan etoson: ni havus ĝin; agrablan kaj komfortan domon: ni havus ĝin; facile atingeblan regionon: ni havus ĝin... Mi povas aserti, ke, post plibonigoj, la domo en Sablé plaĉos al ĉiuj, kaj estos konsiderata agrabla: ripozo en la parko, promenadoj en la kamparo, fiŝkaptado, ekskursoj, sportoj. Certe ni povus trovi pli taŭgan domon, sed estas grava punkto: la neceso por la estro de tiu Domo loĝi proksime. Mi esperas emeritiĝi post unu jaro. Eble mi povos disponi pri la necesaj jaroj por firmigi la aferon."

Jen la unua ŝtono de la Esperantista Kulturdomo. Forta ŝtono, ĉar Henri Micard antaŭvidis ĉiujn detalojn, ĉiujn argumentojn kaj kontraŭargumentojn, streĉe pripensitajn dum sendormaj noktoj. Ĉio estis jam preta en la menso de Micard. 40 jaroj pasis. La domo en Sablé ne estis aĉetita pro nesufiĉaj mondisponeblaĵoj. Sed la deziro realigi la revon plifortiĝis ĉe Micard, kiu la 18-an de oktobro samjara vizitis la kastelon Gresillon.

*****~***~*****

NI FUNEBRAS- Post la presado de la lasta numero de la revuo atingis nin du malĝojigaj novaĵoj: Simonne Rousseau, edzino de nia amiko Jack André Rousseau mortis; tri semajnojn poste ankaŭ lia bofrato Maurice Bernet mortis. Al Jack, al lia fratino Odette Bernet, al ilia familio iras nia plej amikaj kondolencoj.

Ankaŭ alia amiko de Gresillon kaj de la greziljonanoj malaperis, Gines, edzo de Isabelle Martinez. Al Isabelle ni diras: "estu certa, ke ni multe pensas pri vi."

LIBRO - SERVO

Alvenis kelkaj pliaj libroj vendotaj aŭkcie. Jen do la kompleta listo kun la bazaj prezoj. Temas pri malnovaj eldonoj tute ne plu haveblaj. Profitu la okazon! Proponu viajn prezojn al S-ino J. Vincent, 26 bis rue de Milngavie, 49150 BAUGE, tel. 41 89 29 47. Ricevos la librojn, kiuj plej altpreze ofertas.

1- LA DORMANTO VEKIGAS (H.G. Wells)- 1929 - Kartone bindita. 210 p. - 19 X 12 cm.

2- FUNDAMENTO DE ESPERANTO - 1931 - Esperanta parto Gramatiko, Ekzercaro - 36 p. - Broŝurita 18 X 11 cm. 15 f.

3- LETEROJ DE ZAMENHOF - 1948 - Vol. 1 367 p.- Prezentaĵo kaj komentado de G. Waringhien - Tole bindita - 20 X 14 cm.

Vol. 2 372 p. Ambaŭ: 100 f.

4- SINJORO TADEO- (A. Mickiewicz) - 1955 - 334 p. - Tole bindita 21 x 15 cm. 70 f.

5- LA FARAONO- (B. Pruss) - 1957 - Vol. 1. 296 p. Tole bindita

Vol. 2. 358 p.

Vol. 3. 307 p. La 3: 90 f.

6- MEMORLIBRO DE LA ZAMENHOF-JARO- (I. Lapenna) - 1960 - 104 p. + fotoj. Tole bindita 29 x 22 cm. 70 f.

7- TIO, KION MI KREDAS- (J. Rostand) - 1962 - 39 p. - Broŝurita Subskribita de la aŭtoro - 19 x 13 cm. 30 f.

8- VIVO KAJ OPINIOJ DE MAJSIRO M'SAUD- (J. Ribillard) - 1963 143 p. - Broŝurita - 30 f.

9- LA GOJA PODJO- (R. Schwartz) - 1975 - 266 p. - Broŝurita - 20 x 14 cm. 50 f.

La sendkostoj estos senpagaj.

ATENTU! Nia Libro-Servo povassendi al vi ĉiujn lerno-librojn, vortarojn legolibrojn... Nur petu la katalogon de:

S-ino J. Vincent, 26 bis rue de Milngavie, 49150-Baugé

La kvara eldono de "Por la Praktikantoj" preskaŭ elĉerpiĝis.

La 5-a eldono aperos nur fine de la somero. Mendu tuj!

NE FORGESU niajn perkorespondajn kursojn. Tri niveloj. Petu informojn

de S-ino Vincent (adreso supre)

NIA KONKURSO



La listo de la gajnintoj de nia konkurso « 1990 » aperos en la venonta numero. Intertempe, la premiitoj estos ricevintaj rektan informon.

En 1991, responde al la petoj de pluraj legantoj, ni denove aperigos la paĝon « Gramatiko per Bonhumoro ». Ni esperas, ke tiu paĝo estos same bone akceptita, kiel estis la nun preskaŭ tridek-jara serio.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

« Se du komplementoj estas ligitaj per la vorto « kiel », tiam mi ordinare akordigas kaze la sekvantan komplementon kun la komplemento antaŭiranta, ĉar alie la senco estus tute alia kaj la nominativa komplemento sence rilatus ne al la antaŭstaranta komplemento, sed al la subjekto de la frazo. « Mi elektis lin, kiel prezidanto signifas : « Mi elektis lin ĉar mi estas prezidanto »... « Mi elektis lin, kiel prezidanton » signifas « kiel mi elektas prezidanton » aŭ « por havi prezidanton ».

L.L. ZAMENHOF, Lingvaj Respondoj



— Mi ricevis 50.000 dolarojn por labori en Usono, kiel oficiala pentristo.

— Vi ricevis ilin de eŭropanoj, kompreneble ?



— Bonvolu akcepti tion, kiel donacon okaze de la reveno de via naskiĝdato.



— Ĉu mi povas daŭre konsideri lin kiel inteligentan viron ?

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (7,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10^e-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).

Japanio : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).

Jugoslavio : Jugoslavia Stelo, D. Ozme 7/IV, 71000 Sarajevo.

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 16 n.z.dol).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugaliao : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboâ.

Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgratan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 2012-3 (70 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni ia internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34